

FRANCA

PRIEURE SAINT-MARTIN
77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro A. BESSIERE 28, rue C. Saint-Saëns	76000 ROUEN
Sekr:F-ino G. PREUX 55/3 Rés. Terrasse Rue du 11 novembre	59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue Milngavie	49150 BAUGE
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon	59000 LILLE
Peranto I.K.U.E: P-ro R. DEGRELLE 12, r. Estienne d' Orves	54490 PIENNES

C.C.P: Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN.

==== la n^o: 8 F. Abono: 30 F (TTC). Kotizo: 10 F. Sumo: 40 F. ====

+++++

==== N^o 170 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== SEPTEMBRO 1991 ====

+++++

N.B. La materialo por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent napre antaŭ
la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

+++++

LE MOT DU PRESIDENT

La Langue Internationale, nous le savons tous, n' est pas seulement un outil merveilleux de communication; c' est aussi le moyen de se sentir proche des hommes de tous les pays et de voir en chacun d' eux un ami. Les espérantistes se rapprochent ainsi, parfois sans en avoir conscience, de la doctrine du corps mystique du Christ, qui veut que chaque croyant se considère comme le frère de tous les hommes, puisque ceux-ci ont tous le même père dans les cieux.

C' est dire que les membres de notre association ont plus que tout autre l' obligation d' un comportement fraternel ouvert sur les problèmes mondiaux et les moyens de les résoudre dans un esprit de concorde et de respect mutuel.

A. B.

LA BILETO DE LA PREZIDANTO

La Lingvo Internacia, ni ĉiuj tion scias, estas ne nur mirinda interkomprenilo; ĝi estas ankaŭ rimedo por sin senti proksima al ĉiulandaj homoj kaj vidi amikon en ĉiu el ili. Tiel la esperantistoj, foje nekonscie, alproksimiĝas al la doktrino de la mistika korpo de Kristo, kiu volas, ke ĉiu kredanto sin konsideru frato de ĉiuj homoj, tial ke ĉi tiuj havas la saman ĉielan patron.

Tio signifas, ke la anoj de nia asocio devas pli ol iu ajn alia havi fratan sintenon malfermitan al la mondaj problemoj kaj la rimedojn por ilin solvi en konkorda spirito kaj reciproka respekto.

+++++

INFORMO

La venonta komitatkunsido okazos en Paris 4 bis, rue de la Cerisaie la 20-am de oktobro 1991 je la 14.00.

Observantoj daŭre estas bonvenaj.

LA INFANVILAĜOJ

Post la dua mondmilito, juna aŭstra kuracisto Hermann Gmeiner konstatas la malfeliĉon de multaj orfoj. Li opinias, ke ĉia helpo estas senvalora se la orfo vivkreskas ekster hejmo, sen familio por akcepti lin.

Li do kreas infanvilaĝon en Imst (Tirolo) en 1949. Tie apartigitaj domoj akceptas infanojn (1), kiuj vivas en la konstanta kunesto de virimo, kiu anstataŭas iliam patrinon kaj edukas ilin, kvazaŭ ili estus ŝiaj propraj gefiloj, en familia rondo kaj amoplena etoso.

Iom post iom multaj aliaj infanvilaĝoj estis starigitaj en Eŭropo kaj poste en la tuta mondo. En Francujo la unua infanvilaĝo estis kreita en 1956 en Busigny (Nord). Nuntempe ili estas 9.

Baldaŭ infanvilaĝoj estos starigitaj en Rumanujo kaj poste, laŭ eblecoj, en aliaj orienteŭropaj landoj. Tiel multaj orfoj havos la ĝojon kreski en familia etoso kaj feliĉe pretiĝi al la plenkreska vivo.

(1) NDLR: substrekindas la fakto, ke la orfaj gefratoj restas kune.
oo

LA ŜARĜO

Sur ŝtona kruta vojeto, mi renkontis junulinon
Portantan dorse sian frateton.

Knabino, mi diris al ŝi, vi portas pezan ŝarĝon!
Ŝi rigardis min kaj diris:
Sinjoro, mi portas ne ŝarĝon, sed miam frateton!

Mi restis senvorta; la diro de tiu kuraĝulino gravuriĝis en mia koro.

Kaj nun, kiam la homa sufero premeĝas min
Kaj kuraĝo forlasas min, la vorto de la junulino
Memorigas min: kion vi portas estas ne ŝarĝo, tio estas
Via frato.

(Poemo publikigita en la A.C.A.T-revuo)

oo

LA KRISTANO ESPERANTISTO

Kuraĝa leganto, ne fidu! Tiu titolo aspektas banala, ĉu ne? Sed ĝi tute ne estas tia.

La plej evidenta respondo estas, ke la fervora kaj sincera kristano devas tutsimple venigi aliajn fratojn kristanojn al F.K.E.A: la kristama, eĉ katolika esperanta franca movado!

Fakte, la respondo estas multe pli kompleksa, bela, riĉa.

Laŭ la apostolo Petro: "Vi estas raso elektita, sacerdotaro reĝa..., por ke vi proklamu la glorion de Tiu, kiu vokis vin el la mallumo en Siam lumom mirindam." (1 Petro: 2,9)

Fariĝante gefratoj de Kristo per la Bapto, enkondukita de Kristo, la kristanoj esperantistoj havas la honoron samtempe fariĝi:

1. gesacerdotoj esperantistoj,
2. gepostoloj esperantistoj,
3. gereĝoj esperantistoj.

Gesacerdotoj esperantistoj

Estas en la krista Eklezio du sacerdotejoj: la ĝenerala sacerdotejo de ĉiuj kristanoj kaj la aparta sacerdotejo de la hierarkio. Ambaŭ partoprenas la esencan de la unika Sacerdotejo de Kristo.

Tiuj, kiuj ricevis, per la Ordinado, la ministerian sacerdotecon, komune nomitan pastreco, rajtas celebri la Eŭkanistion. Tiu sacerdotejo ĝis nun estas rezervita al la viroj. Kia estos la estonteco? Multaj valoraj virinoj deziras la pastran sacerdotecon; ĉu ili estos elaŭditaj?

La ĝenerala sacerdoteco estas donita per la Bapto, kaj donas al ĉiuj kristanoj, viroj kaj virinoj, la mirindan funkcion de perado inter Dio kaj la homaro. Per la Bapto, esenca sakramento, la homoj iĝas adoptaj fil(in)oj de la Dikreanto kaj adoptaj frat(in)oj de Kristo. Kiel peranto inter Dio kaj la tuta homaro, la kristano povas preĝi por unu aŭ alia homo, por si mem, por iu familiano, amiko, sed ankaŭ por la tuta homaro kaj la sukceso de iu ajn homara valoro: paco, politika ordo, socia organizo. La kristanoj ne ĉion atendu de Dio, sed ĉefe petu la lumon por vidi la manieron solvi la problemojn, kaj la kuraĝon por labori je ties solvado.

Num, la esperantistoj pli kaj pli plene ekzercu sian bapteman sacerdotecon kaj ligu la homaron al la kreanto. Tiel ili vivos la homaranismon, fonton de universala Paco. Ilia kristanismo ne restos senutila, sed pli kaj pli larĝa, pli universale ili ekzercos sian mirindan vokiĝon por:

- a) la progreso de la homa kulturo,
- b) la feliĉo de la homaro, speciale de la tria mondo,
- c) la homara Paco.

L. BOURDON o.p. (daŭrigota)

XX

LA BIBLIAJ SCIENCOS

Oni povas legi la Biblion laŭvorte kaj kompreni iun ajn frazon tiam, kia ĝi estas. Tion faras iuj religiaj sektoj. Se ili legas: "Mirindaĵoj, kiujn faris por ni la Sinjoro", estas tre bone. Sed se ili obstinege kredas, ke Josvo haltigis la sunon, tio estas absurda.

La diversaj partoj de la Biblio estis verkitaj en diversaj epokoj, dum ĉirkaŭ mil jaroj, de diversaj aŭtoroj - eĉ kelkfoje interne de la sama libro - en malsamaj cirkonstancoj kun malsamaj intencoj, do en ĝenroj malsimilaj: rakonto aŭ poemo, leĝo aŭ preĝo...

De cent aŭ cent kvindek jaroj, la ekzegezisto aplikas al la Biblio sciencajn metodojn, dank' al pli bona kono de la antikvaj lingvoj kaj de la historio, de la arkeologiaj malkovroj, precipe en Egiptujo kaj Palestino.

Tial ĝi klopodas rekonstrui la tekston transmetitan en malnovaj manuskriptoj, analizi ĝin por malkovri kaj precizigi la sencon, la intencojn de la aŭtoro, reloki la tuton en ĝian epokon, en ĝian medion.

Tiujn metodojn la kristana ekzegezisto rigore aplikas, same kiel li farus por iu ajn teksto, sed li ne forgesas, ke la aŭtoroj, kun la pensmaniero de sia tempo, laŭ sia temperamento, verkis sub la inspiro de la Sankta Spirito. Li, pere de ili, rivelacias al la homoj sian projekton pri la homaro, sian amon, la vojon al la savo.

Laŭ la esprimo de Galileo, la Biblio "instruas, kiel ni devas iri en la ĉielon, kaj ne kiel fartas la ĉielo".

Konklude: "La Biblio postulas seriozan studadon".

El paraña bulteno

trad. G. PREUX

XX

KIEL DIO NIN ALPAROLAS?

"Dio nin alparolas unue per la belo de Naturo, due per nia propra vivo, trie per Sia Sankta Parolo": jen resumo de prediko, kiun mi bone memoras post du-dek kvin jaroj. Ĝi gvidas mian tutan spiritan vivon, kaj la riĉeco de ĉiu el la tri fontoj komprenigas al mi, ke mi ne enuos en paradizo.

Sed tie kuŝas du problemoj:

- 1. Kiel difini tiujn fontojn?
- 2. Ĉu per tiuj fontoj parolas nur Dio, aŭ ankaŭ aliaj estaĵoj?

Ĉu Satano ne semis lolon en Naturo? Ĉu mia libero ne modifas mian vivon? Tamen, praktike, tiuj du demandoj ofte forvaporiĝas sub la Diaj Mirindaĵoj: paradizajn primicojn de ĝuo kaj admiro ni enlasu infankore, kaj demandojn elpelas laŭdo.

..//...

GENERALA KUNVENO EN AMIENS

Leteroj ricevataj: el Kaunas (Litovio), de la episkopo de Amiens, de la Nordfranca E^o Federacio.

S-ro Bessière prezentas la agadraporton kaj S-ino Vincent la financam.
Balotado: venis 37 voĉdoniloj - 34 aprobas la agadraporton.
31 " " financam

Ĉiuj kandidatoj al la komitato estas elektitaj

Kongresoj:

1992 apud Lyon de la 30-a de aprilo ĝis la 3-a de majo

Maison St-Joseph "Chantegrillet" 161, chemin des Fonds 69340 FRANCHEVILLE

1993 en Lourdes;

1994 en orienta Francujo

I.K.U.E: P-ro Degrelle deziras baldaŭan anstataŭanton kiel peranto.

KOMITATKUNVENO EN AMIENS

Post aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno, oni reelektas la estraron.

Necesas informi la lernantojn pri la ekzisto de F.K.E.A.

La nova presmaŝino iĝas propraĵo de la asocio.

U.F.E.-kongreso: P-ro Goudé povis diservi en Boulogne/Mer.

Diversaĵoj: Banneux - eblas partopreni en la malsanul-procesio.

Lourdes: inviti Hispanojn, Italojn, Germanojn, Svisojn.

Paris: renkonto pri Biblio 24-an de majo, je la 17.00

=====

DIA GRACO

"Se vi scias ion interesan..." jen eĉas la redaktorina peto.

Skribas J. BERTRAND/ Ne temas pri sperto mia, sed pri reala okazintaĵo, kiu emociigis tiujn, kiuj vidis ĝin.

Unu el miaj nevinoj, baptofilino mia, estis edziniĝonta. Ŝi estis la plej juna filino de unu el miaj fratinoj kaj la pli aĝaj jam de longe estis edzinoj. Iam antaŭ la evento, la nevino petis, ke mi anstataŭ ŝian patron kaj procesie konduku ŝin ĝis la preĝeja altaro. Tion mi plezure konsentis, ĉar la kompatinda patro me plu povis paŝi. De kvar jaroj li kuŝis enlite pro nekuracebla, Alzheimer-malsano. Iom post iom li perdintis ĉiujn mensajn kaj korpajn kapablojn. Lia sindonema edzino daŭre rifuzis enhospitaligi lin por senfika kuracado, kaj konstante flegadis lin hejme kun amo, kaj tiel deziris daŭrigi la flegadon... ĝis la fino.

Kelkajn tagojn antaŭ la geedziĝo ekestis la lasta fazo de tiu terura malsano, kaj al la kadukulo restis nur iomete da vegeta vivo. Mia fratino timegis, ke la morto trafos ŝian edzon antaŭ aŭ eĉ dum la festo, kaj ŝi fervore preĝis por ke la Patro Ĉiopova atendu ankoraŭ iomete antaŭ ol voki al ŝi la karam malsanulon.

Nu, la geedziĝo ĝoje okazis sen tiu timinda, neoportuna ĉagremo... Sed la morgaŭon, post la foriro de la lastaj invititoj, la agonianto trankvile mortis. Por li estis la fino de kalvaria vojo, kaj en tiu forpaso kaj ties dato, ĉiuj vidis signon de la dia graco... Jes ja, Mia Sinjoro estis aŭdinta la preĝon de ŝia servistino!

=====

ĤORSEĜOJ - HISTORIA SKIZO

Ĉiu nomiana urbo havis sian civilan bazilikon: ĝi estis tribunalo, kiu povis esti uzata ankaŭ kiel kovrata vendejo aŭ kunvenejo. Pli poste, la guberniestro, imperiestra anstataŭanto, okupadis tronon funde de la absido, malantaŭ la pretorejo. En ĉiu flanko de la trono, konsilianoj kaj ŝtatoficistoj lokiĝis sur sidŝtuparoj. Post kiam Teodozio donis al la kristanoj statuton en la imperio, la Eklezioj konstruis bazilikojn kiel oportunajn kunvenejojn. La episkopo, kapo de la Eklezio, okupadis katedron funde de la absido, malantaŭ la ĉefaltaro. En ĉiu flanko de la katedro, la presbiteraro lokiĝis sur sidŝtuparoj.

..../...

Baldaŭ en la latina Eklezio, la katedra ekleziularo adoptis prikonduitan regulon kaj organiziĝis en kanonikaj komunumoj. Ĉi tiuj kunvenadis plurfoje tage en la baziliko por diri la kanonajn preĝojn: matutino, laŭdoj, primo, terco, seksto, nono, vesproj, kompletoj. Oni stare kantadis psalmojn, kantikojn kaj himnojn; oni stare recitadis la preĝojn, kun manoj levitaj (kiel Moseo en la dezerto). Oni rajtis sidiĝi nur dum iuj legadoj kaj homelloj; iuj maljunaj aŭ malsanaj klerikuloj ne povis elteni tiajn diservojn: estis permesite al ili sim apogi sur bastonoj, kaj eĉ malpezigi la korpan pezon dank' al apogstangoj. En riĉa komunumo kiel Amiens en la XIII-a jc. la katedra preĝejo estis samtempe la signo mem de la civita belegeco kaj la plej mova ŝanĝloko: la kanonikaraj diservoj estis celebrataj en la preĝeja orienta parto, la paroĥa agado okazis en la virgulina kapelo, fondajaj mesoj en la multaj kapeletoj, foje sekvataj de frataraj kunvenoj, dum la popolamaso vagadis konversaciante kaj eĉ negocante, kelkaj medite preĝadis. Ĉu estis pli bona loko ol la vasta preĝejo por ratifi pacojn aŭ militpaŭzojn?...

En tia moviĝema loko, la klerikaro eksentis la bezonon je iom da kvieto kaj rezervis por la episkopo kaj la kanonikaro lokon, kiu ili fermis per ĉirkaŭbariloj. Tiu fermita ĥorejo konsistis el la sanktejo kun la ĉefaltaro, la katedro kaj la ĥorejo, kie la kanonikaro emestis. De longe la kantistoj uzis "scabella", similajn al la kantoraj skabeloj, kiujn oni ankoraŭ vidas en kelkaj vilaĝaj preĝejoj. Malgraŭ sia alteco kaj senkomforteco, ili havigis utilan ripozon dum la longedaŭraj diservoj.

Ni transformu la apogstangojn en fiksjajn kubutapogilojn, ni alkroĉu la skabelon kiel seĝeton sub la moveblan seĝon, kaj ni estas, kiel en la momaĥejoj komence de la XII-a jc. inventintaj la modernan ĥorseĝon. Indulga progreso, oni nomis la seĝeton "mizerikordo"; oni lasis la dekoradon al la plaĉo de la skulptistoj. Plejparte oni traktas profanajn temojn, kvazaŭ oni trovas insulte sidiĝi sur religiajn emblemojn. Nur en la XVI-a jc. la katedraloj S-ta Stefano en Auxerre kaj Nia Sinjorino en Amiens havas la mizerikordojn en la ĥorseĝa biblia programo.

En Amiens en 1508, la kapitulato kontraktis kun du lignaĵistaj spertuloj, "maîtres huchiers", Arnould BOULIN kaj Alexandre de HEUDEBOURG, kaj unu pentristo-skulptisto Antoine AVERNIER. Krom la nomoj de tiuj majstroj atingis nin tiuj de Linard LE CLERC, Guillaume QUENTIN, Pierre MEURISSE, iu bretono, kaj la famekonata Jean TURPIN, kiu subskribis dufoje en la artaĵo. De la 120 ĥorseĝoj, 110 supervivis la beligadon de la XVIII-a jc.

Du elegantaj piramidoj kronas la ĉefĥorseĝojn de la doĵeno kaj de la reĝo. Doĵeno estras en sia katedralo, lia ĥorseĝo estas dekstre, tiu de la reĝo maldekstre. La Malnova Testamento disvolviĝas kiel filmo sur parto de la vertikalaj paneloj, sur ĉiuj mizerikordoj krom unu kaj sur la manapogiloj.

Sude, ekde la doĵena ĥorseĝo, la supra vico montras al ni la Kreadon, Noan Abrahamon, Rebekon, Jakobon. Reirante okcidenten, la malsupraj seĝoj traktas pri Jakob kaj Jozefo. Norde, ekde la reĝa seĝo, Jozefo, vicreĝo en Egiptujo, akceptas siajn fratojn; revenante al la ĉefa krado, la malsupra vico rakontas pri Moseo, Simsono, Davido kaj Ijobo. La Nova Testamento legiĝas tra la vivo de Maria sur ĉiuj vertikalaj paneloj; de okcidente orienten, ekde la doĵena, poste de la reĝa. Ne ĉiuj ilustritaj temoj viciĝas en la S-taj Skriboj; kelkaj estas apokrifaj, iuj apartenas al la tradicio. Plejparto de la personoj de la du Testamentoj vivas en la XVI-a jc. en la Amiena regiono, tamen la tieaj homoj metas sur la manapogilojn kaj la pendoskulptaĵojn siajn ĉiutagajn zorgojn, metiojn, kutimojn, moralon.

Tiu Amiena taĉmento plenumis tie pure pikardan laboron, kiu hodiaŭ estas inter la tutmondaj majstroverkoj.

M. COLLEU

ENHAVO

- | | |
|-------------------------------|----------------------------|
| 1. Le mot du président | 4. Kiel Dio nin alparolas? |
| 2. La infanvilaĝoj - La Ŝarĝo | 5. Raportoj pri Amiens |
| La kristano esperantisto | Dia graco |
| 3. La bibliaj sciencoj | 6. Ĥorseĝoj |

Dépôt légal: 3è trimestre 1991	!! Polycopié par l' A.C.F.E. (emregistrée le
C.P.P.A.P. n° 62 532.	!! 6 mai 1977 à la sous-préfecture de Saumur
Directeur: Albert BÉSSIERE	!! sous le n° 2523 bis - J.O.23/05/1977)
Dir. délégué: René-Jean MARMOU	!! au prieuré St-Martin
	!! 77610 LA HOUSSAYE EN BRIE FRANCE